# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 18/03/2021 Kvincentdudekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 830,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **295,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **245,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **220,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **70,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




### N.ro 26 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKA KVIZETO: Kiom da eraroj estas en la sekvanta peco, kaj kiuj?

" Krom la patron ni vidos hieraŭ la patrino kun ilia dek gefilo; ni al ilin parolis, escepte al la patron, kiun parolis la tuta tempo kun iun vira koleginon de ilian lernejon, kiu vizitadas ankaŭ niajn gefilojn. "

Vi trovos la solvon de la kvizeto ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.

**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**



★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***





# La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato.Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 20a de marto estos la tria sabato. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Vizitantoj ĉiam bovenaj *Roger Springer*

## El Okcidenta Aŭstralio




Dum niaj lastaj Rondoj (Konversaciaj renkontiĝoj), ni (la membroj de la Esperanto Ligo de Okcidenta Aŭstralio) legis artikolojn el al libreto "Esperanto por mi". Ĝi estas kolekto de 16 portretoj de diversaj kaj aktivaj Esperantisoj kune kun biografietoj skribitaj de ili. La portretoj estas faritaj de Helga Plöter, kiu estas Esperantisto kaj kiu ankaŭ estas unu el la 16!

Ni tre ĝuas la libron. Ni lernas multajn novajn vortojn kaj kreskigas nian scion de la Esperanto-movado tutmonde. Se vi estas interesita pri aĉeti la libron, ĝi estas disponebla en la UEA libroservo:
https://katalogo.uea.org/?inf=9802. Ni tute rekomendas ĝin. *Shayne Power*



Estas bona Timĉjo. Sed ne por la fridujo. *Petro Danzer*

### Ĉu Aŭstralianoj mortus por defendi usonan Pine Gap?



En aŭstralio la ĉefministro havas la solan eblecon ekigi militon.
Ne la parlamento per voĉdono.
Nun Usono minacas Ĉinio kaj la supra demando estas aktuala!



*Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Kio estas Mono?



Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo? Uzo de la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj, Oleo? Gaso? Karbo? Atomo? Vere riĉigas la homaron, **sed bedaŭrinde ne ĉiujn.**
La nuna ekonomio funkcias, ĉar multaj homoj aĉetas deziratajn aferojn ne nur vivesencajn aferojn. Aliaj homoj mortas por la manko de mono. Stultega afero!



# Universala baza enspezo (UBI)

## Por pli kontentiga kaj sekura mondo

La homoj voĵaĝas per aviadiloj.
La virusoj ankaŭ uzas la aviadilojn! Ve!



Universala Baza Enspezo helpas ĉiujn homojn
Anstataŭ bezoni labori por travivi, la plej multo de homoj povas fari kion ili vere volas fari sen ĉargreno pri ekonomia sklaveco.
Komputiloj kaj lertaj maŝinoj detruas la eblecon de homa laboro kaj riĉigas nur 1%
Do senlaborantoj helpas la planedon. Ĉiuj homoj estas gravaj.

Nur post kiam ĉiuj homoj havos bazan enspezon, tiam la super riĉuloj povus flugi al Marso.




*Roger Springer*

# Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj!
Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj!
Sube estas ligilo por mia magazeno de jam prezentitaj humurbildoj... Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc




Amikoj estas kiel libroj.
Ni ĉiam elektas la plejbonajn.





| https://tiny.pl/rn9gc_ | Kun elkoraj salutoj | ***Marian** ZDANKOWSKI* |
| --- | --- | --- |

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Historio de la *ESPERANTO POCKET TEXTBOOK*



Mi renovigis la malnovan ŝlosil-libreton por uzi ĝin por propagandi Esperanton. Margaret Chaldecott retajpis la gramatikon kaj Roger ĝisdatigis la ceteron. Mi ne deziris pligrandigi la libreton, alie ĝi estus nur alia lernolibro. La celo estas studentoj de lingvoj por ke ili povu kompari la grandecon de la bazaj lernolibroj.




**Elŝutu** http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo

**kaj mem kreu kopion de la poŝa ŝlosilo per via komputilo.** *Roger Springer*

***(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917***



# D e m o n s t r a c i u !

## KONTRAŬ LA MILITOJ !

Mi opinias, ke la malplejo kion ni povas fari kontraŭ milito por havi sukceson, estas partopreni en kontraŭmilitaj demonstracioj. La demonstracioj kontraŭ la milito de Usono kaj Aŭstralio kontraŭ kaj en Vjetnamujo estis tiom ege grandaj, ke ili rezultis en la returnigo de la aŭstralia armeo. Partoprenis homoj de diversaj politikaj konvinkoj, ankaŭ homoj kiuj kutime voĉdonas por la konservativaj partioj, kiuj tiutempe funkciis kiel la registaro. Ĉar ankaŭ Usono tiam decidis eliri el tiu milito, la oficialaj perdintoj estis Usono kaj Aŭstralio, kaj la venkinto estis la t.n. komunista Vietkong. Se vi vizitas la centron de Vjetnamujo, vi povas viziti la multajn sekretajn subtervojojn fositajn de la Vjet-Kong. En la milito en Afganujo Usono kaj Aŭstralio nur duone gajnis, ĉar ili faris tiun militon samtempe kontraŭ Rusujo, anstataŭ kunlabori kun Rusujo kiu jam havis konsiderindan sukceson en sia batalo kontrau la Islama Fronto. Kaj en Turkujo ili lasis la regadon fali en la diktatorecon de la fanatika kaj brutala parto de la islama dekstrularo kontraŭkristana. En ĉiuj kazoj okazis en Aŭstralio demonstracioj, sed kelkaj tro malgrandaj kaj do nesukcesaj.



Mi proponetas ke ni helpu ĉiujn specojn de kontraŭmilitaj demonstracioj, eĉ se ĝi organizatas de movado kun kies alia platformo ni ne samopinias. Tio signifas, nur se la demonstracio estas nur kontraŭ milito. Ekzemple se aŭ/kaj iu socialista aŭ/kaj la Country Party aŭ ambaŭ demonstracios kontraŭ milito kontraŭ Ĉinujo.

*Marcel Leereveld.*

## KELKAJ SEKRETOJ PRI MIAJ AVOJ .

Mia perpatrina avo perdis, je la aĝo de 18, unu kruron, sed la katolika eklezio trovis por li samaĝan edzinon, mian avinon do. Post deko da jaroj, dum kiuj ŝi naskis tri filinojn, pro mistraktado de siaj nemalriĉaj gepatroj, ŝi fariĝis malrapide blinda, komplete post dek jaroj. Dum la unua deko da jaroj de tuta blindeco ŝin prizorgis la tri tre junaj infanoj, sed post tio, dum trideko da jaroj, ŝin prizorgis ŝia edzo, mia avo kun la ligna kruro, tute sola. Li meritas laŭdegon ĉar ŝi sidis la tutan tagon sur seĝo, kaj li purigis ŝin, nutris ŝin, vestis ŝin, necesejumis ŝin, kaj malvestis ŝin vespere, ĉar la filinoj havis siajn proprajn familiojn. Kiam

fine, maljuna ĉar tre sana, ŝi mortis, li deziris alian edzinon, por ĉifoje prizorgati. Kaj ŝi kompreneble devis esti katolika. Sed la eklezio ĉifoje ne trovis, kaj do li mem trovis nekatolikan edzinon por prizorgi lin. Tio kaŭzis severan proteston de la eklezio, sed li defendis sin per "Vi eĉ ne estas kapablaj trovi por mi edzinon", kaj ili devis akcepti la geedziĝon. (Katolikoj tiutempe ricevis iom pli da senlaborula subvencio).



Cetere dum lia tuta vivo liaj monhavaj gepatroj helpis lin donacante unu post la alia negoco, sed li neniam sukcesis en tio: li ne havis komercistan spiriton. Nur kiam maljuna li sukcesis en manlaboro, fine kiel angilokaptisto.

Mia perpatra avo ankaŭ venis el monhava familio. Sed je la aĝo de ses lia patrino mortis, kaj oni sendis lin en katolikan orfejon. Tiu patrinperdo ege malĝojigis lin kaj kolerigis lin, kaj ĉiutage li kriis ke Dio estas fiaĉulo ĉar Li forprenis de li lian patrinon. Li diris tion sian tutan vivon, eĉ kiam li estis plenkreskulo kiam li sciis ke Dio ne ekzistis. Pro tiu kolero liaj katolikaj instruistoj havis problemojn kun li, sed li tamen sukcesis fariĝi klera meblofaristo kun sia propra fabriketo. Kiam ne plu juna li perdis tiun fabriketon ĉar li idealisme kaj marksisme fordonis ĝin al siaj laboristoj kune. La eksperimento ne sukcesis, ĉar liaj laboristoj ĉesis labori kaj forprenadis sian salajron el la fabrika kaso. Sed almenaŭ li kapablis aĉeti butikon kaj fordoni ĝin al sia plej juna filino. Ambaŭ plu voĉdonis por la Komunista Partio. Mi, estante en Nederlando anarĥiisto, neniam voĉdonis en iu ajn elektado.

La ĉisupraj informoj donatis al mi de miaj fidindaj onklinoj. *Marcel Leereveld.*

# Ĉu multegaj voĉdonantoj en Okcidenta Aŭstralio voĉdonis kontraŭ la nunaj rilatoj inter la Landa Parlamento kaj Ĉinujo?

Kiuj rezultis en perdo de laborpostenoj, komerco, enspezo kaj eble milito.
Mi konas la malsamajn respondecojn de la ŝtata kaj federala parlamentoj, SED??
Ĉu ili donis averton al la Ĉefministro de Aŭstralio ke Ĉinujo ne estas nia malamiko?
*Roger Springer*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*

**SOLVO DE LA KVIZETO**: En la teksto estas 17 eraroj. Jen la senerara teksto:
"Krom la patro ni vidis hieraŭ la patrinon kun iliaj dek gefiloj; ni al ili parolis, escepte al la patro, kiu parolis la tutan tempon kun iu vira kolego de ilia lernejo, kiun vizitadas ankaŭ niaj gefiloj. " *Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** En la elsendo de la 15a de marto aŭdeblas intervjuo de Stefan MacGill pri lia reveno al sia lando post 40 jaroj , raporto pri la esperanta monunuo kaj informoj pri diversaj temoj *Franciska Toubale*

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***